

KNABINO

(Lennon/Mc Cartney)

Esperantigo: E. Rovere

Ĉu bonvolas vi aŭskulti la rakonton pri l' knabino,
kiu dolorigis min ?

Temas pri la ofta tipo de virino,
kiu sorĉas kaj perfidas ĝis la fin'.

Knabino....

Knabino.

Ŝi promesis veran amon kaj dediĉon,
tamen sentojn ŝirkolektis nur sur ŝin.

Valoregis por ŝi nur, ke viroj ŝin admiru:
vera estis ŝi koketulin'.

Knabino....

Knabino.

Inoj foje ŝatas vin ŝajnigi stulta ul' ĉe l' geamikoj;
viroj ofte ne konscias, ke ekzistas inoj
malvarmaj, sendankaj, egoismaj, kruelaj...

Knabino....

Knabino.

Kiomfoje ŝi min eĉ neglektis kaj per larmoj,
poste, pardonpetis ŝi sen hont';
kaj ĵuradis, ke ŝi ne plu tiel agos
sed perfidis min refoje en estont'.

Knabino....

Knabino.